

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung; Robert Kreuz, LK.; Prof. D-ro Ing-ro R. Orenge. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114)

VOL. I * N-RO 6

MONATA ALBONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JULIO 1932

Survoje al Konsilanta Gramatiko.

Redaktanto: Teo Jung.

Ree alvenis amaso da materialo por tiu ĉi rubriko. Bedaŭrinde multaj sendas demandojn, kiuj tute ne prezentas ian malfacilaĵon kaj kiujn oni devus povi mem respondi al si post kurso por komencantoj. Aliaj ripetas aŭ variigas tion kio estas jam dirita. Ankaŭ tio ne havas grandan valoron. Ni preferas ricevi demandojn kaj ekzemplojn ne tiel facile decideblajn, por ke ni povu diskutigi ilin.

*

Intertempe aperis bonega gramatika libro por germanoj (Prof. Dr. Göhl †, *Ausführliche Sprachlehre des Esperanto = Detala Gramatiko de Esperanto*), kiu por germanlingvanoj grandparte jam signifas tion, kion ni celas per nia „Konsilanta Gramatiko“. Kvankam konsentante ne pri ĉio en ĝi dirita, ni ankaŭ ĉi-loke povas senhezite rekomendi ĝin al ĉiuj dezirantaj klarigon pri la plej multaj gramatikaj demandoj.

*

Ni ripetas, ke materialon por ĉi tiu rubriko oni direktu al s-ro Teo Jung, Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.; sed ĉiun ceteran materialon por „Lingva Kritiko“ al s-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo.

Gramatikaj demandoj.

20. Fonetiko.

En vortaro oni povas trovi jenajn vortojn: absceso, absurda, adstringa, asbesto, azteko, ekbalio, ekzakta, ekzotika, ekzameno, ekzemplo, ekzisti, okzado, substanco, substitui. Al mi ŝajnas, ke laŭ fonetikaj reguloj ne estas eble prononci la vortojn tiel, kiel postulas ilia ortografia esprimiĝo. Por prononci ilin korekte, oni devus fari paŭzon en ĉiu vorto. Kiel procedi? (A.S.)

21. Pronomo.

Cu korekta estas la frazo, trovita en „Al Torento“ de St. Engholm: „Aŭ onies ekstero permesas al oni alparoli knabinojn, danci kun ili, ŝerci, amindumi — aŭ ĝi ne permesas tion“? (K.J.)

22. Prepozicio. (Esprimo de sentoj.)

Cu vi bonvolos klarigi la rolon de en en la frazo: . . . kaj aŭskultas en la plorantaj voĉojn de la violonoj el la palma ĝardeno . . . ? (E.C.)

23. Devojiĝi, deflankiĝi, flankeniĝi.

Laŭ mia opinio la formo „deflankiĝi“ estas nekorekta; ĉu mi estas prava? (M.)

24. Zamenhafa tabelo.

„Multaj aliaj“ — mi trovis ĝin en Heroldo n-ro 14, pĝ. 2, kol. 1, 17-a linio de mal-

supre; sed ĝi estas ofte ripetata malĝustaĵo verŝajne pro manko, en multaj hejmlingvoj, de la vorto aliu. (A.Z.)

25. Prepozicio: de, per.

En Heroldo n-ro 14 mi legis la esprimojn: „ornamita de kreskaĵoj“, kaj: „La atmosfero estas ŝargita de pulvo“. Cu „de“ ne devas rilatiĝi nur al individuo aŭ kaŭzo iganta, ne al ilo? (A.Z.)

26. Prepozicio: de, da.

En Heroldo n-ro 21 mi legis: „duonan milionon da vortoj“, kvazaŭ miliono havus la econ „duonan“. Cu ne pli preciza estus: „duonon de miliono“? (A.Z.)

27. Vortfarado.

Cu vi opinias ke „memfarita homo“ estas internacie komprenebla? (Laŭ angla „self-made-man“.) (M.W.)

Respondoj.

15. Direkta -n.

S-ano G.A. en N. prave diras ke „nedubeble iri ĉe iun estas korekta“. Generale tamen sufiĉas iri al iu; se oni argumentas, ke iri al ne esprimas la atingon de la celo, oni prefere uzu eventuale viziti iun.

18. Participo.

Mi tre ĝojus, se fine oni plu ne obeus la strangan malpermeson pri t.n. „absoluta ablative“. Ties uzo mallongigas, malpezigas la frazon. Kaj ĉu vere, ke kelke da samideanoj ne povas kompreni tian parolmanieron? (G.A.)

19. Imperativo.

S-ano G.A. skribas pri la frazoj 3.—4. i. a.: „Tiaj subkomprenajoj estus veraj pensakrobataĵoj, kaj mi demandas min, iom malkviete, per kiela kunteksto oni sukcesus klarigi ilian misteron.“ Kompreneble, tiaj formoj estas tre maloftaj kaj apenaŭ konsiderindaj; ni konsideris ilin nur pro la demando de s-ano J.D.

20. Fonetiko.

La plimulto el la „neprononceblaj“ vortoj devenas de latinaj kunmetaĵoj kun prepozicioj, ekz. ab, ad, sub. Tiaj kunmetaĵoj rezultas ankaŭ ĉe la kunmeto de Esperantaj radikoj kun iuj el la prepozicioj, prefiksoj ktp.: apudstari, ĝisdaŭri, postdiri, subkuŝi, transdoni, ekbati, monatgazeto. Tio, kompreneble, ne estas kontentiga respondo al la demando de A.S. Sed ni pensas ke oni ne bezonas rompi sian kapon pri tio, ĉar ĝis nun la esperantistoj bone interkompreniĝis,

ĉe prononcante ne ĉiam absolute korekte laŭ la ortografio de tiaj vortoj.

21. Pronomo.

Devas esti onia. Pri la eraro kunkulpas la redakcio de Heroldo, ĉar ĝi ne korektis ĝin.

22. Prepozicio. (Esprimo de sentoj.)

La demandinto verŝajne opinias superflua la prepozicion en en la citita frazo. Sed estas diferenco. Sendube, sen en la frazo estus korekta; aplikante en, la aŭtoro supozeble volis akcenti pli multe la direkton ol la violonsonojn, aŭ li volis esprimi ke la aŭskultanto provis kapti difinitajn tonojn, aŭ simile. Esprimo de sentoj!

23. Devojiĝi, deflankiĝi, flankeniĝi.

Ĉiuj formoj estas eblaj. Sed kutime oni erare uzas deflankiĝi anstataŭ unu el la du aliaj. Deflankiĝi povas logike nur signifi iĝi for de la flanko, do la malon de tio, kion oni intencas esprimi per ĝi.

24. Zamenhafa tabelo.

Ci tie eraras s-ro A.Z. Tabelserio aliu, alies, aliam, aliel ktp. ne ekzistas ĝis nun. La radiko estas ali kaj ne alj; sekve korektaj estus: aliiu, alies, aliam, aliel ktp. Eventuale la Akademio povus enkonduki la *s-ieron aliu ktp., sed tiukaze ĝi devus deklari la adjektivan radikon ali arkaismo (por eviti miskomprenojn, ekz. ĉe alie), kio ŝajnas al ni eksperimento ne tre rekomendinda en la nuna epoko de nia lingvo.

25. Prepozicio: de, per.

En la unue citita frazo la senco ŝajnas postuli „per“, supoze ke la homoj plantis la kreskaĵojn. Sed en la dua frazo ne temas pri vera pulvo, per kiu oni ŝargis la aeron (tio cetere estus neebla), sed pri bilda esprimo; tial „de“ estas korekta; pli logika estus: „La atmosfero estis kvazaŭ ŝargita per pulvo.“

26. Prepozicio: de, da.

Eble la esprimo duono de miliono da vortoj estas pli logika sed certe ne pli belsona ol duona miliono (aŭ: duono da miliono, aŭ: duonmiliono) da vortoj, same kiel ankaŭ: milionduono da vortoj. Cu ni fendu harojn? Ciu el supre cititaj esprimoj estas gramatike korekta kaj nemiskomprenbla.

27. Vortfarado.

Ĝi estas anglismo, komprenebla nur al homoj konantaj tiun esprimon el la angla lingvo kaj pro tio neaprobinda. Pli bona estus: sinfarinta (ĉe memfarinta) homo (komparu: sinmortiĝinto, memmortiĝinto); sed eĉ tio ne donas sencan, ĉar neniu homo povas „fari“ sin mem. Tamen oni povas fari sin io, aŭ iu, ekz. reĝo, diktatoro, esperantisto, riĉulo; sed kiel esprimi tion per unu vorto? -iĝinto ne esprimas la aktivecon, entenatan en la esprimo sin fari io. Eble: sinsukcesiginto?

Antaŭ ol, antaŭ kiam.

Pravegan respondon donis la redaktanto de la rubriko „Survoje al Konsilanta Gramatiko“ al la 7-a demando. Mi nur ne komprenas, kial oni ĝenerale ne uzas analogiajn formojn por la ceteraj tempindikaj konjunkcioj.

Por indiki tempan rilaton inter ago en ĉefa frazo kaj ago en komplementa frazo oni uzas tempindikan konjunkcion. La simpla formo de tempindika konjunkcio estas **kiam**. Por pli precizigi aŭ diferencigi la nomitan tempan rilaton oni bezonas aldoni prepozicion aŭ adverbeton, kiu kune kun la vorto **kiam** havas konjunkcian valoron.

La ago en la ĉefa frazo povas okazi en, dum, antaŭ, post ktp. la tempo, en kiu okazas la ago de l' komplementa frazo. La signifikon de „en la tempo, en kiu“ oni esprimas per **kiam**. Logike do pruviĝas, ke la pli precizigitaj tempindikaj konjunkcioj formiĝas el la bezonata prepozicio aŭ adverbo kune kun **kiam**, kaj ne sen tiu vorto aŭ kun alia konjunkcio (ke), kiu ne havas tempan signifon.

Sed kio montriĝas en la praktiko? Anstataŭ logika, sistema tabelo de parencaj esprimoj, kies solaj diferencoj estas la diferencoj en la tempa rilato inter la nomitaj agoj, oni uzas kaŝon de esprimoj, jen kun **kiam**, jen kun **ke**, jen kun **ol**, jen tute sen konjunkcio. La lastan formon oni pravigas, dirante, ke tiuokaze la prepozicio (**dum**, **ĝis**) estas mem konjunkcio. Sed mi demandas min: kial atribui al prepozicio la senco de konjunkcio, kiam la bezonata konjunkcio estas facile formebla kaj eĉ analoge al samkarakteraj esprimoj? Jen la kaŝo de l' praktiko: **dum = dum kiam = dum ke; ĝis = ĝis kiam = ĝis ke; antaŭ kiam = antaŭ ol; tiom longe kiam = tiom longe ke; nun = nun kiam = nun ĉar**.

Prezentiĝas ankoraŭ aliaj demandoj: Kial oni pli ofte forlasas **kiam** post **dum**, sed neniam post **post**? Kial oni diras **ĝis ke** sed ne **post ke**? Kial oni uzas **antaŭ ol** anstataŭ **antaŭ kiam**, sed neniam analoge al tiu formo ankaŭ **post ol**? Oni povas kontraŭdiri ekzemple, ke en unu okazo (**dum = dum ke = dum kiam**) ne ĉiam temas pri nepra tempa rilato. Ne grave. Por ne rompi similitudon, mi ankaŭ ĉi-okaze preferu uzas **dum kiam**. Oni pripensu, ke ankaŭ la indika adverbo **tiam** ne ĉiam havas nepran tempan senco, ekz. en la frazo: Ĉu li estas malsana? **Tiam** (tiuokaze) mi tuj vizitos lin. Kaj por esprimi kontraston oni ja povas diri **kontraŭe** anstataŭ **dum kiam**. Jen la regula tabelo de tempindikaj konjunkcioj, kiaj mi ilin preferas:

kiam
antaŭ kiam
post kiam
ĝis kiam
dum kiam
de kiam
nun kiam
tuj kiam
tiom ofte kiam
tiom longe kiam

Kaj klarig-aldone kelkaj ekzemploj:

Antaŭ kiam li forlasis la urbon, li vizitis min.

Post kiam li estis vizitinta min, li forlasis la urbon.

Atendu, ĝis kiam mi revenos.

Si lernis, dum kiam li legis.

De kiam mi lastfoje renkontis lin, li tre maljuniĝis.

Nun kiam mi konas lin, mi gardas min kontraŭ li.

Tuj kiam li vidis min, li paliĝis.

Tiom ofte kiam mi vidis lin, mi rememorigis lin pri ĝi.

Tiom longe, kiam pluvas, mi restas hejme.

En ambaŭ lastaj ekzemploj oni ankaŭ povas diri: tiom ofte **kiam** kaj: tiom longe **kiam**, rigardante **kiam** kiel mallongigon de **kiam** ofte, resp.: **kiam** longe.

G. J. Degenkamp.

Grupo-reagoj.

De G. Schattat.

(Ril. al „Reguloj kaj formuloj“ en n-ro 2.)

En la femio oni konas „grupo-reagojn“. Tio signifas: certa reago estas kaŭzata ne nur de unu substanco, sed de tuta grupo de substancoj. Ankaŭ en la lingvoj ni trovas tiajn grupo-reagojn. La „enkadigitaj formuloj“ en la artikolo „Reguloj kaj formuloj“ montras tion pri radikoj, la sekvantaj diskutoj montras tion pri afiksoj.

Pro la tempo pasinta de la publikigo de „Reguloj kaj formuloj“ mi ripetis la formulojn 1 ĝis 8 kaj mencias ankaŭ la poste bezonatajn formulojn 9, 10*):

1. vibo = vibaĵo + vibado
2. dajo = dajaĵo + dajeco
3. soba, sobe = jesobo
4. viba 1 = vib-povanta, vib-helpovanta
5. viba 2 = viba = jevibo
6. personi, besto = agi kiel persono, besto
7. objekti, substanci = agi per objekto, substanco
8. daji = esti daja
9. debj = agi debe
10. debjo = deb-ago + debeco

La esprimo „objekto“ en formulo 7 opinias ĉiujn substancojn, kiuj ne estas nura substanco (oro, arĝento ktp.) kaj ankaŭ ne estas persono aŭ besto; „objektoj“ en la senco de formulo 7 do estas vegetaĵoj (vivantaj objektoj), mebloj, instrumentoj ktp. — La esprimo „aji“ havas en Esperanto plurajn signifojn, almenaŭ du:

- aj (malvasta) tenas en si nur objektojn kaj substancojn,
aj (vasta) tenas en si ankaŭ personojn kaj bestojn.

1. Substancaĵoj.

Por personoj kaj bestoj ni havas la afikson „ui“, kies specialformoj estas „id, an, ist, estr“. Por objektoj kaj substancoj ni havas la afikson „aj (malvasta)“, kies specialformoj estas „ul, ing, il“. La nomitaj afiksoj havas substantivan karakteron; ili do reagas en derivoj, kiel substantivaj radikoj (formuloj 3, 6, 7) ekz.:

ŝuisti = agi kiel ŝuisto (germ.: schustern).

Interesa lingvo-leĝo ebligas ofte ekscii, ĉu radikoj estas substantiva aŭ nesubstantiva. Tiu lingvo-leĝo devenas el la fakto, ke nura „o“ ne povas aldoni signifon de difinita persono aŭ besto (se oni ne rigardas la specialan regulon pri anto, into, onto — ato, ito, oto). Tial: se radikoj kun nura „o“ signifas difinitan personon aŭ beston, tiu radikoj estas substantiva.

*

Pri la netradukitaj radikoj de l' Oficiala Klasika Libro (parto II) kaj pri la neoficialaj radikoj la vortaristoj kelkfoje devas elekti inter du vojoj:

* sob = substantiva radikoj, vib = verba radikoj, daj = adjektiva radikoj, deb = ad-verba radikoj, je = prepozicia radikoj.

A) formi la personan signifon per nura „o“. Tiu metodo deklaras la radikojn kiel substantivan, submetitan sub la formulojn 3, 6.

B) formi la personan signifon per „ui“. Tiu metodo deklaras la radikojn kiel adjektivan (grandulo), adverbeton (rapidulo), verban (pagulo) ktp. kaj submetas la radikojn sub la leĝojn de ĝia grupo.

2. Agoj.

Por agoj ni havas la afiksojn „ig“ kaj „iĝ“. La nomitaj afiksoj havas verban karakteron; ili do reagas en derivoj kiel verbaj radikoj (formuloj 1, 4, 5). Ekz. laŭ formulo 1 post verbaj radikoj la nura „o“ povas anstataŭi la formon „aĵo“; tial anstataŭ finaĵo kaj finaĵo (germane: Endung) oni rajtas ankaŭ diri finaĝo, kion faris Zamenhof.

Interesa lingvo-leĝo ebligas ofte ekscii, ĉu radikoj estas adjektiva aŭ neadjektiva. Tiu lingvo-leĝo devenas el la fakto, ke adjektiva radikoj kun nura „i“ ne signifas agon (kiu asertas la malon, tiu ne rigardas, ke difinoj al agoj estas adverbaj radikoj, ne adjektivaj). Tio kaŭzas diferencon en la uzado de „ig“ kaj „iĝ“.

Adjektiva radikoj reagas tiel:

1. Kun nura „i“ ĝi signifas „esti“ tia, ekz. grandi = esti granda.
2. Tial la influanto devas ricevi la verbon kun „ig“, la influato la verbon kun „iĝ“; ekz. mi grandigas truon, truo grandigas. Adjektiva radikoj do havas la reagan leĝon:

influanto : influato = igi : i = i : iĝi.

*

Pri la netradukitaj radikoj de l' Oficiala Klasika Libro (parto II) kaj pri neoficialaj radikoj la vortaristoj kelkfoje devas elekti inter pluraj vojoj por la verba signifo:

A) Radikoj kun nura „i“ signifas „esti“ tia (kia diras la radikoj). Tiu metodo deklaras la radikojn kiel adjektivan, submetitan sub la formulojn 2, 8 kaj:

dajigi = verbo de l' influanto,
dajigi = verbo de l' influato.

B) Radikoj kun nura „i“ signifas „agi“ tiel (kiel diras la radikoj). Tiu metodo deklaras la radikojn kiel adverbeton, submetitan sub la formulojn 9, 10 kaj:

debigi = verbo de l' influanto,
debi = verbo de l' influato.

Ekz. mi rapidigas kamaradon, la kamarado nun rapidas.

C) Radikoj kun nura „i“ signifas: aŭ agi kiel persono, besto (nomita en la radikoj), aŭ agi per objekto, substanco (nomita en la radikoj).

Tiu metodo deklaras la radikojn kiel substantivan, submetitan sub la formulojn 3, 6, 7 kaj:

sobi = verbo de l' influanto,
sobiĝi = verbo de l' influato.

Ekz.: li majstras la logikon, la logiko majstrigas; li hamstras oron, la oro hamstrigas; li martelas ladon, la lado marteligas; li salas fiŝon, la fiŝo saligas.

D) Radikoj kun nura „i“ estas: aŭ verbo de l' influato (escepte de kazo B), aŭ verbo de l' influato (escepte de kazo C). Tiu metodo deklaras la radikojn kiel verban, submetitan sub la formulojn 1, 4, 5 kaj:

vibigi : vibi = influanto : influato,
(aŭ) vibi : vibigi = influanto : influato.

Kion ni ne bezonas.

Multaj el la leteroj senditaj al la Redakcio enhavas teoriajn proponojn pri plibonigoj de esprimoj jam sankciitaj de la uzado aŭ pri enkondukotaj sufiksoj.

Evidente, niaj aŭblaj korespondantoj ne legis nian programan artikolon; per ĝi ni klare eldiris:

„Tial ke Esperanto ne estas iudilo por teoriemuloj, ĉiuj artikoloj estu bazitaj sur la metoda scienca esplorado de nia litera-

turo, kun speciala atento pri la Zamenhofa uzo.“

Estas interese scii, ne kiel samideano A aŭ samideano B dirus tion, kaj tion, sed kiel diras ĝin la plimulto de niaj verkistoj. Oni ne povas paroli lingvon, se oni devas sur ĉiu paŝo halti por pripensi, kion la logiko postulas; kaj ofte tio, kion la logiko postulas, tute ne taŭgas por la komuna uzado aŭ ne bone adaptiĝas je la sistemo de la lingvo.

La Redakcio.

Finrimarkigo.

La signifo „daj“ priskribas substancojn, la signifo „deb“ priskribas agon (ekz.: rapid', oft'). Oni do ne nomu la radikojn „rapid', bigot', furioz“ „adjectivaj radikoj“.

La formoj „deba, daje“ estas intence forlasitaj. Mia ekzistado estas kaŭzita pafte:

1. de fraztransformado: „rapide kuri“ farigas „rapida kuro“.
2. de eliminado: „rapide kura ĉevalo“ farigas „rapida ĉevalo“.
3. de ŝajnderivado: kelkaj radikoj ekzistas en adjectiva kaj adverba formoj kun malsamaj signifoj. Ekz.: bona karbo = altkapabla karbo (adjectiva radiko bon'); bone (morale) agi (adverba radiko bon').

Pri la objektiva genitivo.

(Komparu la artikolon de s-ro Rollet de l'Isle en „Lingva Kritiko“ n-ro 4.)

Laŭ la Fundamento, la prepozicio de anstataŭas ankaŭ la genitivan. Sed jam en la latina lingvo la genitivo, kvankam devenanta de la latina verbo „gignere“, montras ne nur la originon kaj posedon (genitivus subjectivus kaj genitivus possessivus) sed ankaŭ la objekton (genitivus obiectivus). En Esperanto ĝia uzado estas analoga, kaj nenio kontraŭfundamenta estas en tio. Cetere, ne ĉio nelaufundamenta estas ankaŭ kontraŭfundamenta.

Genitivo subjektiva:

Lumo de la suno (= la suno lumas);
kanto de la birdoj (= la birdoj kantas).

Genitivo poseda:

Domo de la estro (= la estro posedas);
estro de la domo (= la domo „posedas“).

Genitivo objektiva:

Lumigo de la ĉambro (= oni lumigas la ĉambro);
prezentado de la opero (= oni prezentas la operon).

En kazoj, kiam miskompreno estas timbla, oni povas anstataŭigi la de de la objektiva genitivo per alia prepozicio (samkiel en latina lingvo oni povas anstataŭigi la objektivan genitivan per prepozicio kun alia kazo) aŭ oni povas elekti alian esprimmanieron:

Vizito de la muzeo (ne miskomprenbla);
vizito de la reĝo (miskomprenbla; anstataŭigebla per: vizito al la reĝo, aŭ: vizito ĉe la reĝo);
murdo de la franca prezidanto (ne miskomprenbla);
murdo de la faŝisto (miskomprenbla; anstataŭigebla per: murdfaro de la faŝisto).

La konsekvenca anstataŭigado de de per je mi opinias nerekomendinda. La gene-

rala tendenco en la Esperanta lingvouzo iras en la direkto, eviti kion eble la uzadon de la nedifinita prepozicio je kaj anstataŭigi per aliaj, pli klaraj prepozicioj al, per, pri k. a. Plej ofte oni trovas la anstataŭigon de la objektiva genitiva de per al, sed ankaŭ ĝi ne ĉiam klarigas la sencon, foje eĉ malklarigas ĝin. Komparu:

Vendo de la sklavino (apenaŭ miskomprenbla; eventuale oni povus diri: vendiĝo de la sklavino);

vendo al la sklavino (miskomprenbla: ĉu la sklavino estas vendata, aŭ ĉu io estas vendata al ŝi? La dua senco estas la kutima! — Ankaŭ apliko de „je“ anstataŭ „al“ ne pliklarigus la sencon.)

Zamenhof mem sufiĉe ofte uzis la objektivan genitivan kaj, en sia „Respondo“ pri de, li celis ĝian uzadon post pasivaj participoj — en tiuj kazoj ĝi ĉiam montru nur la aganton.

Cetere, kiel oni volus forigi la analogan miskomprenblecon ĉe la adjectivigo de la genitivaj formoj? Ekzemple:

Senco subjektiva:

Suna lumo (= la suno lumas);
birda kanto (= la birdo, aŭ la birdoj, kantas).

Senco poseda:

Estra domo (= la estro posedas);
doma estro (= la domo „posedas“).

Senco objektiva:

Ĉambra lumigado (= oni lumigas la ĉambro);
opera prezentado (= oni prezentas la operon).

Prof. D-ro Göhl en sia (cetere bonega) „Detala Gramatiko de Esperanto“ (por germanlingvanoj) esprimas la objektivan „genitivan“ ĝenerale per al (t. e. per la Esperanta „dativo“) sed rimarkigas ke „anstataŭ al oni povas uzi de, se miskompreno ne estas timbla“. Li skribas, ekzemple: „la akcelado al la movado de lertuloj“. Simile oni devus skribi: „la malfermo al la kunsido de la prezidanto“ (anstataŭ, kiel oni skribis ĝis nun: „la malfermo de la kunsido per la prezidanto“). Sed jen minacas alia miskompreno: ĉu temas pri „movado de lertuloj“, pri „kunsido de la prezidanto“? Sangante la vorton, oni ricevas eĉ la kuriozan formon: „malfermo de la prezidanto (!) al la kunsido“.

Konkludo: estas, laŭ mia opinio, ne necese, premi la „objektivan genitivan“ en regulon, kiu ne ekzistas ĝis nun kaj kiu ne multe, aŭ tute ne, klarigus la sencon celatan, kelkfoje eĉ malpliklarigus ĝin. Se do oni permesos al mi elparoli konsilon, mi konsilus, ankaŭ en estonteco uzi la „objektivan genitivan“ same, kiel ĝin uzis D-ro Zamenhof kaj kiel la esperantistaro ĝin uzis dum pli ol 40 jaroj. T. J.

Faklingvaj neologismoj kaj internacieco.

Pri la urĝa neceseco doni al Esperanto la fakajn terminarojn kiujn ĝi ankoraŭ ne havas, oni prave insistas. La rilatoj inter la sciencaj (aŭ, pli ĝenerale, fakaj terminaroj) kaj la komuna lingvo estas diversaj laŭ la fakoj, sed ĝenerale oni povas aserti, ke la vortriĉeco en la fakaj terminaroj ne prezentas la malavantaĝojn, kiujn troa vortriĉeco havas en la komuna lingvo.

Sed ankaŭ en tiu branĉo la internacieco ludas gravan rolon. Se en la ĉefaj lingvoj ia fakuloj uzas specialan terminon, ankaŭ Esperanto bezonas specialan terminon. Se en pluraj lingvoj oni simple uzas vorton de la komuna vortaro en teknika signifo, ni havas la pruvon, ke en Esperanto oni ne bezonas neologismon. T. e., ne sufiĉas la ekzisto de nuanco (nur logika) inter pluraj signifoj por ke oni kreu neologismon: ĝi estas kreinda, nur se oni konstatas, ke tiu nuanco havas specialan esprimilon en la ĉefaj naturaj lingvoj: oni tiamaniere havos gravan pruvon pri reala bezonateco. Tiun ĉi principon, laŭ la metodo sekvita de D-ro Zamenhof por eviti troan vortriĉecon, oni ne povas plene apliki al la komuna lingvo: sed en la fakaj lingvoj ĝi estas senrezerve aplikobla.

Ni ekzamenu laŭ tiu ĉi principo kelkajn vortojn; Oni povus demandi: ĉu, anstataŭ ekvilibro, ne povus sufiĉi la kunmetaĵo egalpezo? El la grandaj eŭropaj lingvoj, nur la germana uzas similan esprimon (Gleichgewicht), dum la aliaj uzas specialan fakajn terminon pri ekvilibro. Prave do oni uzis kaj oficialigis la internacian radikon.

Sed jam la afero estas malsama pri (elektra) kurento. Prave inĝeniero Orengo (en la junia numero de Lingva Kritiko) malkonsilis la vorton: se nur la angla lingvo havus du malsamajn vortojn por kurento kaj fluo, dum la aliaj lingvoj uzas nur unu vorton, ankaŭ por Esperanto unu vorto (fluo) sufiĉas.

Same, por elektj ekzemplon el alia fako, ni malkonsilus por lingvistika terminaro, krei specialan vorton dezineneco flanke de finaĵo. El la grandaj lingvoj, nur la latinidaj havas plurajn terminojn (désinence — terminaison ktp.), cetere sen klare difinebla diferenco: en la teŭtonidaj sufiĉas derivaĵo de la verbo fini (Endung, ending, ktp.): pro tio, finaĵo sufiĉas ankaŭ kiel teknika termino.

Do, la neologismoj, ankaŭ teknikaj, estas utilaj nur kiam ekzistas ne nur abstrakta, logika neceseco esprimi iun koncepton, sed kiam tiu neceseco estas pruvata de la fakto, ke la ĉefaj naciaj lingvoj kreis por tiu koncepto specialan esprimilon.

Bruno Migliorini.

Pri la bezono de Teknikaj Vortaroj.

Tute pravas s-ro E. D. D. dirante, en n-ro 3 de „Lingva Kritiko“, ke urĝas evoluo (aŭ pli bone ellaborado) de Scienca Terminaro (kaj teknika).

Por tion realigi la Sekcio de Teknikaj Vortaroj, krea de la Akademio, jam de longe klopodas, kaj se ĝi ne pli bone sukcesis, kaŭzoj estas vasteco de la tasko kaj manko de personaj kaj monaj rimedoj.

Tamen oni ne devas pligrandigi gravecon

de tiu neekzistado de vortaroj, pri disvastigado de nia lingvo en la teknikajn rondojn. Ĉar tiaj vortaroj povas esti farataj nur de teknikistoj, oni alvenus al tiu bedaŭrinda konkludo ke ili neniam estus faritaj. Efektive tiu situacio estus »neelirebla cirklo«: oni ne povus varbi tiujn fakistojn pro manko de vortaroj, kaj oni ne povus verk' tiujn vortarojn pro manko de esperantistaj teknikistoj!

Feliĉe, kvankam certe estus pli facile varbi teknikistojn montrante al ili vortaron de ilia fako, tio ne estas nepre necesa: estas eble esperantistigi ilin sendepende je ilia fakeco, kiel iu ordinara homo, komprenigante al ilj utilecon, altan celon kaj ĝeneralan taŭgecon de nia lingvo. Nur aludos tiun mankon, por pravigi ilian sintenadon, tiuj kiuj, pro iu aŭ alia motivo, ne interesiĝas al Esperanto.

Aliparte on povos diri, ke, kiam samfakistoj estos sufiĉe multnombraj, ili facile

elaboros vortaron de sia fako. Atendanto tiun momenton, ili povos korespondadi kun alinaciaj samfakistoj uzante, se mankas esperanta terminaro, tiun de sia lingvo — aŭ de lingvo de sia korespondanto — dank' al internacieco de multaj teknikaj vortoj, aŭ se necese, dank' al uzo de diverslingvaj teknikaj vortaroj, kiuj nun ekzistas en multaj fakoj.

Pro tio estas absurde uzi, por kontraŭbatali Esperanton, tiun mankon de teknikaj vortaroj; ĝi pravas nur ke nia lingvo ne estas sufiĉe disvastigata en ĉiuj specialaj rondoj — kio estas bone konata de interesuloj.

Sekve tasko de tiuj, kiuj tamen prave deziras ke tiu manko malaperu, konsistas propagandi vigle en la teknikaj rondoj, kion ne malhelpas tiu manko, se oni uzas la argumentojn, kiujn ni ĵus montris.

Rollet de l'Isle,
Direktoro de la Sekcio de Teknikaj Vortaroj.

La koncepto „paroli“ kaj parencaj konceptoj en Esperanto.

S-ro A. Zambrzycki, eks-redaktoro de Voĉo de Farmacistoj, Kotuń (Polujo), prilaboras listojn de sinonimaj vortoj en Esperanto. Kiel specimenon, ni publikigas ĉi-sube la serion **paroli**.

Paroli
— aĉi
— eti
Alparoli
Atestparoli
Ek —
El —
Fi —
Fuŝ —
Inter —
Laŭt —
Pik —
Pri —
Radi —
Admoni
Agkonsenti
Akcenti
Akuzi
Alegorii
Aludi
Alvoki
Amindumi
Anonci
Apelacii
(Apologii)
Aprobi
Aprobaklami
Araklami
Argumenti
Aserti
Atentigi
Atesti
Atribui
Aŭdienci
Aŭguri
Averti
Avizi
Babili
— adi
— aĉi
Interbabili
Balbuti
Bildigi
Bisi
Blasfemi
Brui
— egi
Buŝi

(Ekskuzi)
(Ekspliki)
Ellogi
Elokventi
Elturmiĝi
Emigi
Epilogi
Esprimi (sin)
— iĝi
Fabeli
— umi
Fabli
Famigi
Fantazi(ad)i
Filozofii
Flati
Flirti
Flustri
Fonografi
Firmigi
Formuli
Frazi
Ĉirkaŭfrazi
(Glosi)

Grinci
Grumbli
Gemeti
Gisveni
Heroldi
Ideinterŝangi
Indignigi
Indiki
Informi
Inklinigi
Insisti
Inspiri
Instrui
Instigi
Instrukcii
Insulti
Interiĝi
— ĵeti
— konsenti
— meti
— kompreniĝi
— vjui
Jesi
ktp.

LINGVA TRIBUNO

„Virĉevalo“ aŭ „ĉevalviro“?

La Esperanta vorto **vir** estas prenita el la latina lingvo. En tiu lingvo **vir** signifas: homo matura „malina“, t. e. homo fizike kaj psike mala je la ino homa, homa estaĵo kiu sin distingas per specialaj kvalitoj — forto, kuraĝo, persisto, seriozo, energio, ktp. — male al la malforto de virino aŭ de nematurulo. Do, **vir** taŭgas por oficoj, por politiko kaj kiel soldato.

Same ankaŭ signifas **vir** en Esperanto. Ni observu, ke Zamenhof, alprenante vorton por nia lingvo, ĉerpis — ne senviviglon, sed porcion da kultura kaj kulturhistoria vivo. Ni do demandu nin, kian rolon ludis kaj kion signifis en la latina mondo **vir**? La centra kaj esenca kerno de tio estos la Fundamenta signifo de tiu vorto Esperanta.

(La ina malo de **viro** estas **virino**. Se oni volas esplori la Esperantan signifon de **viro**, oni ankaŭ kompare ekzameni la signifon de **virino**; ĉar ili ja estas paralelaj.)

Nu, Oni renkontas kelkfoje en vortaroj kaj ankaŭ en tekstoj vortojn de la tipo: „ĉevalviro“, „safoviro“. (Ilin mi vidis unufoje en vortaro de Beaufront. Laŭ lia aŭtoritata influo ankaŭ mi uzis tiujn vortformojn; sed ĉiam kun interna protesto, en malklara sento de peko kontraŭ la spirito de la lingvo!)

Kion tiuj vortoj signifas?
La regulo — n-ro 11 de la Fundamenta Gramatiko — pri vortoj kunmetitaj tekstas: „Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino).“

Laŭ ĉi tiu regulo en la kunmetita vorto „ĉevalviro“ la ĉefa vorto estas „viro“; „ĉeval“ sekve estas neĉefa, serva vorto, kiu ĝin karakterizas. „Ĉevalviro“ do signifas ĉefe: „viro“ (t. e. homo mala al virino), „viro“ kiun karakterizas „ĉeval“. Sekve: „ĉevalviro“ = viro kun ĉevalo(j), ekz.: ĉevalposedanto, ĉevalbredisto, ĉevalvendisto, aŭ alia specialisto pri ĉevaloj.

Oni tute renversas la signifon de la kunmetaĵo, se oni donas al ĝi la senco de **ĉevalo** . . . ĉevalo karakterizata de **viraj kvalitoj**, sed ankaŭ ne tio: nur de unu eco: la sekso!

Pri „ĉevalo“ la formo „ĉevalviro“ estas do tute neebla, tute absurda — oni nur metu apud ĝi ankaŭ la korespondan formon „ĉevalvirino“!

Tolerebla estas nur la formo „virĉevalo“. Ĝi signifas: „vira ĉevalo“ en la senco „virsekso ĉevalo“.

Paul Nylén.

KIU kaj KIO kiel relativaj pronomoj.

Anstataŭ kiu, oni ĝenerale uzas, kiel relativan pronomon, la vorton **kio**, se ĝi rilatas al tuta frazo aŭ al nedifina vorto; ekzemple: „Li ridas konstante, kio estas netolerebla.“ — Jen estas ĉio, kion mi havas. — Diru al mi (tion), kion li faris. — La io, kion mi nun vidas (Grosjean-Maupin, p. 477, Plena Vortaro).“ Se la vorto, al kiu rilatas la relativa pronomo, estas ia substantivigita adjektivo, la sama regulo validas kaj ni diros, laŭ Zamenhof, ekzemple, 1-e kun **kiu**: „Vi ne estas la unua, kiu parolos al mi en tiu maniero. — Eĉ la plej kuraĝa, kiu havas koron. Li estas la sola, kiu povas tion fari“; kaj 2-e, kun **kio**: „La sola, kion mi klare vidas. — La unua, kio sekvas el tio. — La plej bona kion oni povas fari. — La blanka, kion li vidis.“ En la unua kazo oni subkomprenas post la adjektivo ian vorton difinitan, homo persono, dum ke, en la dua, oni subkomprenas la nedifinitan vorton **io**. Kaj ĉe tiu okazo oni devas bone rimarki, ke la **blanka (io)** ne estas tute samsenca kiel la **blanko** aŭ la **blankaĵo**.
H. Boucon.

Bonvolu korekti!

En „Lingva Kritiko“ n-ro 4, „Dokumentoj pri L.I.“, paĝo 3, kol. 1, anstataŭ **kreotaj lingvoj**, legu **kreolaj lingvoj**.

En n-ro 5, ĉefartikolo, pĝ. 2, kol. 1, linioj 29 kaj 35: Mankas piednoto, ke temas pri la redakcio de „Heroldo de Esperanto“ mem, por kiu la artikolo origine estis destinita: pĝ. 2, kol. 2, linio 20, anst. **preferinda**, legu **preferinde**; pĝ. 2, kol. 3, lin. 2/3, anst. **nomita** legu **nomata**; pĝ. 3 supre legu: **Rollet de l'Isle: Sciencia Fundamenta Esperanta Terminaro**. La artikolon ne verkis s-ro Rollet de l'Isle, sed ĝi temas pri libro verkita de tiu ĉi sinjoro.